

Karaj geamikoj,

jen, fine, mi atingis la hejmon, sensxuldigxis pri diversaj jarfinaj raportoj, festumis la novjarigxon (en nia lando tio estas pli granda festo ol Kristnasko; cetere, la Novjaraj ferioj dauxras 9-10 tagojn!) kaj nun provas respondi cxuijn posxtajxojn.

Antaux cxio, mi sincere dankegas cxuijn, kiuj prizorgis mian turneon. Mi sentis min valorega trezoro: tiel cxuij traktis min : Kiam mi revenis al mia laboro, kolego diris: "Ho, nun vi similas al homo: ripozinta, prizorgita, nutregita, dorlotita".

La programo de mia restado estis ricxa kaj densa. Prelegoj (se mi ne miskalkulis, entute 14, de simpla prezentigxo antaux 9-11-jaraj infanoj en Dijon gxis tuttaga seminario pri "Kiel instrui tedajxojn distre" en Lyon), intervjuoj (cxe radio - organizite de s-ro Papciak - kaj du tagjurnaloj en Chateauroux - klopode de s-ino Houviez), akcepto cxe la urbodomo de Le Mans, amikaj mangxoj (unu ecx kun la estro de la vilagxo, kie logxas s-ro Droyer), ekskursoj... En Le Mans dum akcepto cxe la urbodomo okazis neatendita renkontigxo - oni prezentis al mi oficialajn delegacianojn (vicurbestron kaj la cxefon de la internacia fako), kiuj evidente miris kaj, supozeble, malkontentis, ke mi venis sen ilia "beno" (almenaux ili ne montris amikemon kaj afablon). Eble, ili havis malbonan humoron, ankaux pro la aperinta en francaj gazetoj foto el tv-programo pri la rezultoj de la balotado en la Rostova regiono, kiu rezultigis... pli ol 146 procentojn da vocxoj kaj kauxzis malicajn demandojn al ili : Mi iom timis, ke ili gxenos mian prelegon per sia cxeesto. Felicxe - ne. Nek plendoj al mia rektoro... Nu, je problemo malpli.

Mia reveno estis iom malpli serena. Mi bonorde atingis la hotelon, ripozetis kaj gxustatempe vekigxis. Sed, sxajne, la pilotoj ne. La aviadilo malfruigxis je 25 minutoj. Kaj kvankam la alia aviadilo (el Vieno al Rostovo) ankoraux estis surloke, oni ne enlasis min kaj plurajn aliajn samlandanojn... Cxe la klienta servo de Austrian Airlines oni proponis al mi kaj geedza paro el Rostovo flugi tra Prago. Ni rezignis kaj preferis forflugi la sekvan tagon al Rostovo. Sed Air France (kiu kulpis pri la malfruo) rifuzis pripagi nian hotelon. Do, oni proponis alian varianton: flugi tra Moskvo. Ni ne havis alian solvon kaj konsentis. Rezulte anstataux veni al Rostovo cxirkaux la 16-a ni atingis gxin post noktomezo. Dank' al dio, la paro sentis sin sxulda al mi (ili tute ne parolas fremdajn lingvojn - do, mi helpis al ili) kaj veturigis min hejmen. Sed tio ankoraux ne estis la fino, cxar ... niaj valizoj restis en Moskvo. Post doganaj burokratajxoj mi ricevis fine mian valizon la 21-an de dec. (kvankam mi revenis jam la 17-an noktomeze). Nun mi intencas skribi plendon al la aerkompanio, kiu vendis al mi la biletojn.

Resume, malgraux la lastaj miseventoj, mi restis tre kontenta kaj sincere danka al la organizinto (Yves Nicolas) kaj cxuij gastigintoj. Mi pretus iam eventuale turnei denove, eble, gvidi kurson aux seminariojn :) Krome, mi cxiam restas je via dispono, se mi povas iel helpi pri iu informo, fareblajxo ks.

Aleksandr Melnikov